Dek ĝeneralaj admonoj por vojaĝantoj:

1) informu vin detale pri la malsanosituacio en la lando, en kiun vi volas vojaĝi;

2) informu vin ne nur ĉe vojaĝagentejo kaj familia kuracisto, sed ankaŭ ĉe tropikaj institutoj;

3) strikte obeu la kuracistajn kaj apotekistajn konsilojn pri profilaktikaj vakcinadoj ankaŭ de tiuj, kiuj ne estas leĝe devigaj sed "nur" rekomenditaj;

4) observu pedante la higienajn regulojn de manĝado, trinkado kaj persona pureco; krome evitu tro longan ekspozicion al la tropika suno;

5) studu la vivociklojn de la en la vizitlando ofte okazantaj parazitoj;

6) evitu trinkadon de loka, neboligita akvo;

7) evitu manĝadon de krudaj aŭ nesufiĉe kuiritaj viando, fiŝaĵo, legomoj;

8) tio speciale validas por gravedaj virinoj: ili ankaŭ nepre evitu dorlotan kontakton kun katoj;

9) ne banu vin en riveroj, riveretoj aŭ lagoj al vi nekonataj, kaj

10) portu dum vesperaj horoj (de sunsubiro ĝis komenciĝo de la nokto) longajn pantalonojn kaj ŝuojn por plejeble eviti pikojn de moskitoj.

Koncerna esperantlingva literaturo

Sachs R.: Tropikaj malsanoj riskataj dum vojaĝoj. *Acta Sanmarinensia Academica Scientiarum Internationalis*, San Marino, 1993

Sachs R.: Medicina Parazitologio (Helmintozoj. Hompatogenaj platvermoj). Faka kromkajero de Scienca Revuo, Printempo 2001

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Rüdiger SACHS <*IsaeSachs@aol.com*>
Vor dem Brückentor 3
DE – 37269 Eschwege
GERMANIO

Priaŭtora informo

La aŭtoro studis veterinaran medicinon, estis scienca kunlaboranto de Instituto pri Tropikaj Malsanoj, laboris multajn jarojn en Afriko kaj habilitiĝis en la fako Parazitologio ĉe Universitato de Hamburgo, Germanujo.

La vojoj de "pilgrimado en Orienton" (*E.* kaj *N. Rœrich, H. Hesse, P. Hammel*)

Veronika BOTTIĈELLI

La korinklino de Okcidento al Oriento estas eterna. Dum la du lastaj jarcentoj multaj okcidentaj verkistoj eksentis la kontraston inter "la anima rigidiĝo" kaj la energiplena, volonteca vivo de la du mondoj. Eŭropano, kiu "seniluziiĝis pri la XIX-a jarcento" kaj pri la potenca civilizacio de la sekva jarcento, eksentis bezonon de anima renoviĝo. Aperis la strebo transpaŝi la limojn de civilizacio – reen, al la kulturo. Oni konsideris Orienton "gardisto de kulturo".

Okcidento difinis por si du formojn de valoraĵoj: unu estas interna kaj eterna, la alia ekstera kaj efemera. Ili estas kunligitaj, sed ne anstataŭas unu la alian. Perdante la Kulturon dum la vojo al la avantaĝoj de la Civilizacio, Eŭropanoj serĉas helpon en Oriento.

La rusa vojaĝanto *Afanasij Nikitin* diris: "Foriru ni de ĉiuj niaj malĝojoj en Hindion". Hindio kaj Indonezio, Ĉinio kaj Japanio, Tibeto kaj Mongolio interesis pentristojn kaj verkistojn, filozofojn kaj muzikistojn, politikistojn kaj simplajn vojaĝantojn. Ĉiu malkovris por si sian propran Orienton, tiun, kiun li serĉis kaj volis trovi. Pro tio la vojoj de "pilgrimado" malofte interkruciĝis, kaj la idealoj de anima plialtiĝo ĉe diversaj verkistoj kaj pentristoj estis malsimilaj.

Por kelkaj el ili Oriento estis "ekzotiko" (operoj de *K.-M. von Weber* kaj verkoj de *N.A.Rimskij-Korsakov*), por iuj ĝi estis etnografia "miraklo" (pentraĵoj de *E.Delacroix* kaj de *P.Gauguin*), por aliaj ĝi estis same spirita revelacio, kiu povis ŝanĝi ne nur la verkmanieron, sed ankaŭ la vivocelojn kaj vivokvalitojn. Tie ĉi eblas citi la nomojn de konataj rusaj sociaj agantoj *E.I.Rœrich* kaj *N.K.Rœrich*, de la germana verkisto *H. Hesse* kaj de la muzikisto *P. Hammel*.

Ilia verkaro estas originala kaj neripetebla, sed en la serĉoj de sia Oriento iliaj vojoj proksimiĝas. La tempo, kiu rapide kuras en Eŭropo, malrapidiĝas en Oriento, kaj ofte oni havas impreson, ke ĝi tute haltas kaj malaperas. Ŝanĝas eĉ la ideo pri tri etapoj de la tempo – pasinta, nuna kaj estonta.

En Oriento ĉiuj tri kuniĝas. "Pasinto estas nur fenestro en la estonton" skribas *N.Rœrich*. *Hesse* en sia romano "La Ludo en perletoj" prezentas "tri vivopriskribojn". La konata muzikisto *P.Hammel* efektivigas en Oriento "la vojon laŭ spiralo reen" kaj iĝas ĉefo de orientalismo en Eŭropo en la 1970aj jaroj. Ili ĉiuj serĉis la vojojn de interproksimiĝo de la orienta kaj okcidenta kulturoj. En "pilgrimado en Orienton" de la du *Rœrich*, *Hesse* kaj *Hammel* ni povas vidi komunajn etapojn: komence ili intuicie "kolektadas" la bildon de Oriento en sia familio, ofte danke al ies rememoroj, libroj aŭ vojaĝoj.

Elena Ivanovna Rœrich-Ŝapoŝnikova (1879-1955) devenas el la fama familio *de Voroncov*. Ŝia patro, princo *Miĥail Ivanoviĉ*, generalo kaj masono, multe vojaĝis. En lia hejmo troviĝis multaj orientaĵoj, kaj la memoro de gefamilianoj gardis multajn legendojn, ekz. ke en la jaro 1825 Himalajaj saĝuloj konfidis al la princo ĉesigi la agadon de la dekabristoj en Rusio. *Elena Ivanovna* ekde sia infaneco revis pri vojaĝoj en la montaron, en Orienton; ŝi havis la impreson, ke ŝi jam vivis tie, en antikvaj nekonataj landoj, eterne banitaj de Ĉiela Lumo. Ŝi posedis la kapablon klare vidi, kiu orientigis ŝin al ŝia vivocelo.

Nikolaj Konstantinoviĉ Rœrich (1874-1947) transformadis la impresojn pri la Oriento, ĉerpitajn el libroj; li kreis kanonojn pri Beleco, Amo kaj Bono, kiuj kondukis lin en diversajn aktivadojn. *E.* kaj *N. Rœrich* atente studis tutmondajn filozofion kaj arton. *Elena* en la aĝo de 4 jaroj jam bone konis Biblion kaj en la aĝo de 10 jaroj ŝi tralegis filozofiajn verkojn el la hejma biblioteko. La vizio de *Mahatma Moria* en 1907 transformis la vivon de la du *Rœrich*, donis al ili novajn superajn celojn.

La gepatroj de *Hermann Hesse* (1877-1962) estis misiistoj en Hindio, same kiel lia avo, fakulo pri Oriento. En la jaroj de la Unua mondmilito li interesiĝis pri filozofio, aparte orienta ("La Libro de ŝanĝoj" kaj aliaj); li provis difini por si la limojn de la ĥaoso kaj la

kondiĉojn de "kuraĝa malsupreniro en la ĥaoson" – ni povas vidi tion en lia libro "La stepolupo". Poste li skribis: "Mi bezonis multajn jarojn por liberiĝi de interna malamikeco por Eŭropo, atingi Hindion ne per trajno, ne per boato, sed pere de 'magiaj pontoj' – tiam en mian animon eniris la vera Eŭropo kaj la vera Oriento".

Hesse grandiĝis kaj formiĝis inter filologoj kaj lingvistoj, kiuj bone konis la orientan arton kaj religiojn. En 1911 li vojaĝis en Hindion kaj Ĉinion, kie li konatiĝis kun la saĝeco kaj meditado de joganoj. Sed, same kiel la protagonisto de "La Ludo en perletoj", li forkuris de Oriento. Por vere "kompreni" li bezonis multe da tempo. Li vivis en svislanda vilaĝeto kvazaŭ moderna ermito, pasia por Konfucianismo, Daoismo kaj Zeno. Li ĉion volis kompreni memstare, sen helpo de instruistoj. Fine li venis al la konkludo, ke lia pasio por Hindio kaj lia fuĝo el Eŭropo estis finitaj, sed en vero liaj ideoj pri la problemo Oriento – Okcidento evoluis dum lia tuta vivo. Ni povas vidi tion ekzemple en lia romano "La Ludo en perletoj". La kolizio de du protagonistoj – *Knecht* kaj *Plinjo* – respegulas la kolizion de du mondoj, de du vivprincipoj.

Danke al la suferoj, je la fino de la romano la antagonistoj interproksimiĝas: *Plinjo* sentas intereson por la meditado; *Knecht* – gardanto de tradicioj – decidas reveni en la homan mondon. Ĉe alia nivelo aperas alia situacio, solvita pere de "ŝakludo": la arabeskoj varias pere de la ŝanĝo de la ŝakpecoj. Tiu orienta "ŝakluda" pozicio aperas, kiam *Knecht*-lernanto venas ĉe la Granda Frato (*Knecht – Plinjo*). Fininte la edukadon *Knecht* transiras en la saman "kampon" kiel *Dasa* kaj la Granda Frato. Ili personigas la meditecan parton de Oriento – "*vita contemplativa*", kiam la personeco dissolviĝas en la universo.

En la alia "kampo" troviĝas *Plinjo, Tito* kaj la juna lernanto *Tegularius* (*Tegularius – Knecht – Plinjo*). Ili personigas la aktivan parton de la socio – "*vita activa*", Eŭropon kun ĝiaj homaj rajtoj kaj ebleco elekti kaj apartiĝi el la universo. La aŭtoro antaŭas sian koncepton de la morto kiel kondiĉo por krei ion novan. *Knecht* ("servisto" en la germana lingvo) jam per sia nomo personigas la ideon de servado en la vivo. Li konscie ŝanĝas sian mondkoncepton. Li foriras el Kastalio, komprenante, ke li devas servi ne nur ĝin, sed la mondon.

La momento de rezisto en la romano estas aŭtobiografia: *Hesse* rezistis al Oriento en si mem de la infanaĝo: ni memorigu lian foriron el la familio, poste fortan apartiĝon de la "universo-socio" (se eblas tiel nomi la faŝisman Germanion), kaj finfine kreadon de la persono de *Knecht*, kiu revenas al la aktiva vivo. Sed *Tegularius* estas preta anstataŭi lin. En la fino de la romano *Knecht* pereas en montara lago, savante la lernanton – li kvazaŭ "enfluas" en lin; lia morto plifortigas "estontan *Knecht*".

La romano estas fajna kunmetado de strukturoj kaj formuloj, prenitaj el malsamaj sferoj de kulturo, scienco, filozofio. Kastalio estas centro de spiritaj valoraĵoj de la homaro. Tamen ĝi permesas ne evoluon, sed enprofundiĝon. La foriro de la "Magistro de la Ludo" estas komprenebla same al Eŭropano kiel al Orientano. Kastalio troviĝas ekstere de tempo kaj spaco. La romano de *Hesse* estas alegorio, kiu respegulas la serĉojn de la senfineco de la Vero. *Hesse* esprimis tion pere de vortoj, same kiel *N.Rœrich* esprimis tion pere de koloroj sur siaj bildoj, same kiel *Hammel* esprimis tion pere de muziksonoj kaj pere de sia libro "Pere de muziko – al mia Mi" el la jaro 1976.

Peter Hammel naskiĝis en 1947 kaj dum longa tempo vivis en Hindio kaj en Tibeto, studis aziajn religiojn kaj muzikan kulturon. En la eŭropa muziko li fariĝis unu el la fondintoj de "minimalismo" (meditmuziko). Pere de "spiriteca muziko" *Hammel* alstrebas veki "internan aŭskultilon" de la homo, penetri en la profundecojn de lia subkonscio. La minimalismo en muziko fariĝis la reago de eŭropa muzika pensmaniero kontraŭ antikvaj formoj de spirita aktivado, kiuj konserviĝis en Oriento. "Perdita homo de la XX-a jarcento – skribis *Hammel* – danke al la muziko de nova tipo devas trovi novan konscion, retrovi sian animan sanon, malstabiligitan per la produktoj de la civilizacio. Pro tio li devas turni sin al la Kulturo". Fakte, *Rœrich* kaj liaj samideanoj esprimas la saman ideon.

La minimalismo kreis novan tonakcentan (moduladan) lingvon, kies bazon formas konstanta ripetado de ritmo-sonaj formuloj kun elementoj de improvizado, danke al kio la orientaj kaj okcidentaj elementoj (statiko kaj moviĝo) interpenetras sin. Minimalistoj opiniis, ke ankaŭ *Hesse* en la muziko antaŭsentis la mondkoncepton de tuta generacio. La muziko en liaj verkoj ja ekzistas, kiel antaŭsento – li

transdonas ĝin pere de vortoj. Temas pri la disko de *Hammel* kun "melodeklamado" de tekstoj de *Hesse*: "integrala muziko". *Hammel* konvinkiĝis, ke lia "spirita pilgrimado" en Orienton sekvis la bonan vojon, kaj li jam trapasis kelkajn etapojn. La poemo de *Rœrich* "Konsiloj al kaptisto, eniranta en arbaron" estis verkita kvazaŭ speciale por li.

La serĉanta spirito de la verkisto trapasas ok ŝtupojn: vekiĝo, intuicia diveno de sanktaj "gvidadsignoj" el la nebulo de duboj kaj tumulto, komenco de supreniro, transformado de la atendado en la certecon, agado, lukto kaj venko, kaj fine la ĝojo verki, kiu venas kun la konscio ke li estis "trifoje kunvokita". *Hammel* estis proksima al la lasta etapo.

La motivoj de tiu poemo projekciiĝis parte sur la vojoj en Orienton en la verkaro de la du *Rœrich*, de *Hammel* kaj de *Hesse*. Ili ĉiuj pasis tra neklara "kolektado" de sia propra "bildo" pri Oriento. Sekva etapo estis la praktika akiro de tiu Orienta bildo dum la vojaĝoj, kaj transformado de la bildo farita antaŭe.

Post tio komenciĝis krea agado kun neeviteblaj malfacilaĵoj kaj bonegaj rezultoj, kaj kiel pinto la kulmino de ĉiuj streboj – la konscio pri si mem kaj pri sia rolo. Ili ĉiuj faris paŝon al Oriento, ili proksimigis Orienton kaj Okcidenton. "La vorton 'unueco' vokanta ..." helpis ilin en tiu agado.

Aŭtora adreso
S-ino BOTIĈELLI *Veronika*
Rossija, 450076, Ufa-76, a/k 7635
RUSIO
t. (7- 34-72) 50-95-39

Priaŭtora informo

La aŭtorino estas fakulino pri muziko ĉe Baŝkiria Ŝtata Universitato, *Ufa*, Rusio.